# nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2017

## KOMENCIĜAS LA KURSO EN OFICIALA LERNEJO PRI LINGVOJ




La 31an de oktobro estis prezentita en Fuenlabrada la nova kurso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la Oficiala Lingvolernejo de tiu urbo.

Juan del Castillo prezentis la lingvon kaj la kurson.Ĉeestis dudeko da homoj, el kiuj 13 formale aliĝis. Ĝis la venonta mardo 7a de novembro ankoraŭ eblas aliĝi al la kurso, kaj do bv. informi viajn konatojn kaj diskonigi en diversaj forumoj.

La kurso daŭros 45 horojn, kaj la klasoj okazos ĉiusemajne, la mardojn inter la 17:00 kaj la 18:30 horo, kaj estos gvidataj de skipo de instruistoj, sub la kunordigo de Juan.

Interesiĝantoj, povas sendi mesaĝon aŭ telefoni al la numero 666966309, aŭ retpoŝte skribi al adreso madrid@esperanto.es.

## MADRIDANOJ EN VARSOVIO

Du madridanoj, Miguel Fernández kaj Ana Manero, partoprenis dum la 14-a kaj 15-a de oktobro en la Varsovia Kultura kaj Lingva Festivalo, kiun oni organizis en tiu pollanda urbo memore al la centjara datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof.

En la foto, Miguel Fernández deklamas, apud la tombo de D-ro. Zamenhof kaj honore al li, la elegion verkitan de la hispana poeto Miguel Hernández al la morto de lia amiko Ramón Sijé.

Raporton pri la agado vi povos baldaŭ aŭskulti kaj spekti ĉe la podkasto Varsovia Vento. Tiu ĉi, cetere, dum tiuj ĉi tagoj publikigis novajn radiajn epizodojn, kun informoj pri la pasinta Hispana Kongreso de Esperanto en Teruelo.



**nia voĉo** **novembro 2017**

## NOVA ELDONO DE "POETO DE L' POPOLO"

Dum tiu ĉi jaro oni kunmemoras la 75-an datrevenon de la morto de la granda hispana poeto Miguel Hernández. Liaj verkoj estis tradukitaj al Esperanto de lia preskaŭ samnomulo Miguel Fernández, antaŭ 30 jaroj, kun la titolo "Miguel Hernández, poeto de l' popolo".

Ĉijare, okaze de tiu kunmemoro, kaj profitante la okazigon de Kongreso pri li en novembro en la provinco Alikanto, Hispana Esperanto-Federacio publikigos duan eldonon de tiu verko, korektitan kaj ampleksigitan. La verkon prezentos en la urbo Alikanto, la 16an de novembro je la 6-a horo, la prezidanto de HEF, José A. del Barrio, kaj la tradukisto, Miguel Fernández.

## POEZIAJ VESPEROJ



La 23-an de oktobro, kiel anoncite, MEL organizis omaĝon al la elstara poetino Marjorie Boulton, kiu forpasis fine de aŭgusto. Por tio ni aranĝis poezian rondon, kiun gvidis la poeto Jorge Camacho. La evento estis sufiĉe sukcesa; partoprenis dekduo da esperantistoj, kaj oni komentis ŝian poeziaĵon kaj deklamis iujn ŝiajn verkojn.

Ni decidis ripeti la sperton, kaj do la venontan 13an de novembro ni denove organizos poezian rondon. Ĉikaze, ni dediĉos ĝin al la poeto kaj tradukisto Kálmán Kalocsay. Je la 7-a vespere, ni denove komencos la poeziumadon. Se vi interesiĝas, venu, kaj mem selektu poeziaĵon kiun vi deziros deklami, aŭ simple komenti.

## KONGRESOJ EN MADRIDO

Daŭras la laboroj por la organizado de la kongresoj kiuj okazos en Madrido en julio 2018: la 77a Hispana Kongreso de Esperanto (20-22 de julio) kaj la 51a kongreso de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (21-28-a de julio)

Dum la venontaj tagoj ni esperas povi konfirmi la informojn pri la sidejo kaj la gastigeblecoj, kiujn oni nun plu esploras, kaj oni publikigos la aliĝilon kaj ceterajn informojn.

La ILEI-Estraro alvokas kreemulojn esperantistajn kaj neesperantistajn, proponi emblemon de ĝia Kongreso. La temo de tiu ĉi estas "La kultura heredaĵo de Esperanto". Partoprenu en la emblemkonkurso kaj utiligu ĝin por prezenti Esperanton kaj ILEI al lernantoj, studentoj kaj iliaj instruistoj. La reguloj aperas en la retejo de ILEI kaj la kongreso.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. La kutima sabata babilado okazos la 4an de novembro, en kafejo Café Madrid, strato Mesón de Paños, 6, je la 18,00.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com